GISTO, Nov,2008.
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Donaca legaĵo por VK-Ĉeestantoj
Ceteraj ĉefurbanoj sentu sin iom ŝuldaj.

11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11 11

Z-TAGO/2008

Sciindas, kion planas GEA por festi la gravan E-eventon en la Gaŭĉolando.
Mi, por la dimanĉo 14/12-15h00, pensas proponi bierumadon, flanke de mia domo al ĉ.15 interesataj samurbanoj scivolaj pri Esperanto. La invitilo mencios preferon pri homoj kiuj scias fremda(j)n lingvo(j)n pretekste eltrovi la devenon de kelkaj vortoj de nia lingvo.

LERTIGA BABILADO

Plaĉis, verŝajne ne nur al mi, la pasinta kunsido en GEA, la unuan sabaton de novembro. Kunsidis bela grupo kune kun la GEA-prezidanto, Marcelo. Ĉiuj aktive partoprenis. La malnodigo de ne kutimaj vortgrupoj, far Cezar, vekis viglan intereson de ĉiuj ni. Domaĝe mi ĉiam devas fortroti frue, por ne perdi plej oportunan buson.

MAKULO

La alvenintoj en la supre menciita kunsido rimarkis GEA-misfaron: la akceptanto portis T-ĉemizon kies surbrusta legaĵo iom ĝenas observemajn gesamideanojn. Tie staris transitiva verbo sekvata de rekta objekto kun ĝia adjektivo, **sen la respektivaj akuzativoj.** Inter ni, “hejmanoj” tio ne tre gravas sed, se alvenas alilandano, la impreson kiun li/ŝi kunportos nepre estos negativa pri la gaŭĉa E-movado, laŭ mia sensignifa opinio. Multe helpus skribila korektaĵo. Ĝi indikus malŝaton al aĉaĵoj. Se ni abomenas multe legadi, ni neniam elsarkos brazilajn dirmanierojn el nia pensejo, neniam akiros internaciecon.

POŜTKARTOJ

Reklami tre multekostas , certe ĉiu scias.
Kio estas ne vidata, pri tio oni ne sciiĝas.
Tial mi daŭre strebas por ke ĉiuj gesamideanoj adoptu la uzadon de poŝtkartoj, sen kovertaj, nudaj, por ke la serio da manipulontoj havu ŝancon “spioni” tekstojn kiujn ni komunikas, por ke ĉiu scivolulo aŭ kontrolisto mem konstatu kiom facilas kompreni la lingvon kaj ke ni neniel sekretumas aŭ komplotas kontraŭ aferoj malpermesataj de la Ŝtato. Ni estu bonedukitaj homoj, ne neglektante mesaĝon ricevitan. Ĉu al vi plaĉas la sinteno de geamikoj kiujn vi atentigas pri detaloj observendaj sed ili respondas eĉ ne per la vorteto “dankon”? Laŭ mi, tia sinteno samas diri:“mi fordankas vian stultan helpon”. Neniam plu oni provos esti helpema al tia persono. El tio rezultas ke la samideanoj vivas izolitaj de la ceteraj dum 330 tagoj en la jaro. Kaj velkas kaj ŝimas – Nu ja, konsentite, ke la Internet mildigas la izolitecon tamen tro multaj el ni ankoraŭ ne kapablas aŭ timas posedi komputilon, pro troa altigo de la telefonkonto, pro la multekosta riparado, pro timo sufiĉe ellerni la uzadon.

ĈRI

La radionda propagado, laŭ 40m kaj 30m bendoj daŭras bona, kun signaloj de 7 ĝis 9+ laŭ la radioamatora skalo, de nulo ĝis

9 tamen kun iomete variema intenseco, per mia eta ĉina radioricevilo.

KANCERO

Doloras aserti tristan kaj nekaŝeblan veron, ke la homaro delonge estas jam ne plu kuracebla kancero de nia gastigema planedo Tero. Jam delonge mankas akvo laŭ kvante necesa por ke ĉiuj nacioj povas vivi dece. Oni legas ke je ĉiuj 40 jaroj la homaro duobliĝas sed la trinkakva fonto restas daŭre la sama; la aero saturita de pluraj gasoj; la maroj iĝis rubejoj, marbestoj trompitaj glutas plastaĵon kaj mortas pro maleblo digesti ĝin; la tero ricevas venenojn ĉiuspecajn se ne, fi-insektoj voras niajn nutraĵojn. Krome aldoniĝas atomuzinoj kiuj liveras ĝis nun ne detruigeblan rubon. La sidera spaco plenplenas de rubaĵoj iam falontaj!
Religiuloj konsolas: “Dio prizorgos”. Ja, vere, sed nur por pokaj transvivantoj. Milaroj pereas ĉiutage sen la promesita prizorgo. Karaj, ĉu vi aplaŭdas viajn junajn parencojn ankoraŭ kuraĝe multobligi tutmondan loĝantaron? Oni potence elsendu “S O S”! Eblas ke la plej kulpaj, poluemaj Ŝtatoj iam aŭdos ĝin kaj kompatos la malriĉajn naciojn

TASKO por brazilanoj.

Laŭ mi, oni rajtas traduki la vorton FINGIR per roli: *Spiono rolas vulgaran spektanton...fripona ulo rolas nescianton.*
Ĉu vi konsentas?

PLASTAĴOJ

Ĉu vi iam vizitis la urban rubejon, nur por vidi kiom granda montaro el plastaĵoj tie amasigas? Ne? Nu, eble tial en via hejmo oni neglektas separi sekan de organan rubon. – Oni aĉetas botelon da vino en ĉiovendejo, ĉe la kasisto oni metas ĝin en unu mansaketon. Se ŝi/li timas ke ĝi ne eltenos la pezon, vi malavare ricevos plus unu aŭ du saketojn. Laŭ statistiko, ĉiu hejmo uzas po 500mil jare. Tio pezas ĉ.40 Kg. Oni reciklas nur 5%. Kial ne la tuton? Ĉar recikli unu Kg. kostas ĉ. USD$4,00; fabriki el nova materialo kostas nur USD$0,004.
RACIA S0LVO ECOLOGIA: la registaro adoptu la efikan solvon de saĝaj landestroj. Sankcii leĝon jenan: ĉiu plasta mansaketo kostas, ekz. R$ 01,00 pagenda al la kasist(in)o, se la kliento ne provizis sin per ne-plasta ujo por kunporti siajan ĉetaĵojn. Tuj amasiĝos nur 1% la elplasta montaro, kiu kaŭzas terurajn kapdolorojn al ĉiuj urbestroj.

.....

Ĉu ie vi legis la infrajn tekstojn? – Bvolu:

RADIKALE ŜANĜI

Ĉu enuigas vin la fakto ke daŭre sampartia grupo ruderas en via municipo? Nu, en Bonjesuo de Paraopeba-RJ, 89,23% de la balotantoj decidis nuligi sian voĉdonrajton, laŭ informo tra Internet. Oni nun esperas ke el tio rezultos la demokratia rajto ne plu esti devigata voĉdoni dum balotadoj. Oni agu.

ENBUSA SCENO

Veturas plenplena buso. Ino turnas sin al stara kunveturanto kaj plendas: ĉu vi bonvolas turni vian volumenan poŝon alidirekten?...ĝi ĝenas min! La ulo: sinjorino trankiliĝu, ĝi estas ne tio kion vi pensas. Ĝi estas la salajro kion hodiaŭ mi ricevis, envolvis kaj metis ĝin en mian pantalonpoŝon.Ŝi: do ŝajnas ke vi estas ekzemplodona oficisto. Li scivolas, kial? Ŝi pravigas sin: ekde la enbusiĝo ĝis ĉi tie vi ricevis tri salajroaltiĝojn.

ULO KAJ PORDISTO

Sur bildo videblas trudema ulo, kiu volas senpage eniri varietean spektaklon. La pordisto staras meze de la pordo, kun etenditaj brakoj baras lin. La trudemulo demandas: ĉu vi scias kiu estas mia patro? La pordisto: ne, eĉ via patrino ne scias kiu estas li !